

Esperanto Societo Frankfurto

# Esperanto-Informilo

**Februaro 2026**




Foto: U. Fellmann, la 23-an de januaro. sunsubiro ĉe Frankfurto.

Mesaĝo de la prezidanto:
Ĉu estas rilato inter kvantumaj procesoj kaj la evoluo de kosmaj struktoroj? Tiun demandon jam en la kvindekaj jaroj de la lasta jarmilo fizikisto kaj filosofisto C.F.v.Weizäcker kaj aliaj trapensis kaj poste sia kolego T. Görnitz daŭrigis kaj etendis tiujn ideojn montrante, ke la klasika faktbazita natursciencoj sole ne povas klarigi la kosman, kemikan kaj biologian evoluon, sed nur per la novaj scioj de la kvantumteorio la estiĝo de vivo kaj konscio estas eksplikebla. Pli en la eseo kun la temo "Konscio – Ĉu la scienco povas klarigi ĝin?"

G. Hennemann, la 2-an de februaro 2026



Rubrikoj ĉi-numere:


- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Esperantaĵo
- Lasta paĝo


Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann
Rehgartenstrasse 16
35683 Dillenburg
Tel.: 02771 8196614

**Bankverbindung / bankkonto:**
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: BE92 9051 1007 7223
BIC: TRWIBEB1XXX
bei: Wise, Belgien

**Jahresbeitrag / jarkotizo:**
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

# Programo

**Unua mardo**
La 3-an de februaro 2026
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo
Ligilo: https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain

———

**Dua mardo**
La 10-an de februaro 2026
ekde la 19-a horo:  Interna babilado per Zomo

Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

———

**Tria mardo**
Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 17. Februar, 2026 --- Mardo, la 17-an de februaro, 2026

18:30 – 19:30 h
Lingva Rondo
“”

19:30 h
Vortrag Prelego
“Ondoj – strangaj monstraj estaĵoj”
G. Hennemann

———

**Kvara Mardo**
la 24-an de februaro
ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo“
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Mai

---

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm en Frankfurto je Majno

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg


# El la klubo

## Anoncoj:

- 03.02.2026 19:00 Morĝaŭ ni volas provi unufoje renkonti per la jitsi-aplikaĵo,
  Ligilo: https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain

- 17.03.2026 19:00 Membrokunveno en la Saalbau MÜZ, Friedrich-Rompf salono,
  vidu ankaŭ la anocon je la lasta paĝo





**elstaraj fotoj:** “Miaj fotoj de la tago (16:03 kaj 17:35 loka tempo)”, de U. Fellmann

# Konscio – ĉu la scienco povas klarigi ĝin?

## Eseo pri la libro “De kvantuma fiziko ĝis konscio“ el la jaro 2016 de T. Görnitz

de Georg Hennemann

En la 858-paĝa libro “De kvantuma fiziko ĝis konscio: Kosmo, menso kaj materio”, kio unue publikiĝis en la jaro 2016, la aŭtora teamo *Thomas kaj Brigitte Görnitz* provas respondi la demandojn “Kion ni komprenas per konscio? Kiuj estas la fundamentaj principoj de kvantumteorio? Kio estas la ligo inter la du?”. La ĉefa tezo de la fizikisto kaj matematikisto T. Görnitz estas tio, ke sen la plej novaj scioj kaj progresoj de la kvantumteorio, la evoluo kaj la manifesto de konscio ne estas eksplikebla. En dek-tri ĉapitroj li paŝo post paŝo prilumigas kaj klarigas, kiel la nerva sistemo evoluis el la unuaj unuĉelaj estaĵoj kaj kiel informo estas prilaborita kaj transdonita en vivantaj ĉeloj. Sed la klasika biologia ekspliko, nome ke nia cerbo konsistas el nervaj ĉeloj kaj neŭronoj sendas kaj ricevas elektran potencialon, transdonante eksciton estas nur duono de la vero. La klasika mekanista ekspliko de fajrantaj neŭronoj ne sufiĉas por ekspliki la multajn fenomenojn ligita al la konscio, kaj tute ne nian memdeterminitan volon kaj memstarajn autonomajn decidojn, kiuj estiĝas en nia konscio, ofte post longaj kaj profundaj refleksioj kaj pensado. La kvalito de ĉi tiu libro, kiu distingas ĝin de aliaj pseudo-sciencaj aŭ esoteraj verkoj estas la fakto, ke la aŭtoroj rigardas la scion pri nia konscio el diversaj manieroj kaj citas el granda gamo de aktualaj sciencaj esploroj. Mi precipe ŝatas la ideon – origine evoluita de la fizikisto kaj filosofo C.F.v.Weizäcker - ke ĉiuj materioj, energioj kaj eĉ informoj baziĝas je t.n. kvantumaj binaraj informoj, kiuj konsistiĝas nian universum. Tiu estas tute nekonvencia nova ideo, sed per ĝi oni eĉ povas ekspliki la grandan fendon ekzistante ekde la komenco inter la du grandaj fizikaj teorioj, la ĝenerala relativecteorio de Albert Einstein, kaj la kvantumteorio de Heisenberg, Bohr, Schrödinger kaj aliaj. Kun la ideo de bazaj “kvantumaj binaraj informoj - la aŭtoro parolas pri “abstraktaj kaj absolutaj kvantumaj informpecoj (AQI-pecoj)” - ankaŭ la ĝis nun neklarigebla, sed supozataj fenomenoj kiel “malhela energio” aŭ “malhela materio” estas klarigebla.
Post legado la plej interesa fakto por mi estas ke la kvantumfiziko, kio laŭ ĝenerala scio nur priskribas fenomenojn inter malgrandaj partikloj kaj molekuloj, ankaŭ taŭgas por klarigi fenomenojn en pli larĝa, eĉ makroskopa grando, kiuj ĝis nun laŭdire nur klasika fiziko povas priskribi ĵustamaniere.

Ligiloj:

T. Görnitz
https://arxiv.org/pdf/1008.4558
https://vixra.org/pdf/1701.0544v1.pdf
http://www.goernitz.de/data/2017_06_20_Consciousness.pdf
http://www.goernitz.de/data/BewusstseinFFM-Templeton-tagung.pdf

C.F. Weizäcker
https://av.tib.eu/media/11191
https://de.wikipedia.org/wiki/Quantentheorie_der_Ur-Alternativen
https://www.cfvw.org/cfvw/gesellschaft/weizsaecker-gesellschaft.html

# Diversaĵoj

**Ŝerco**:

Paro manĝonta en restoracio mendas trinkaĵon.
Ŝi: Mi petas glason da ruĝa vino.
Li: Ankaŭ por mi, sed bonbolu en pura glaso.

Ŝi (flustre, dum la kelnero foriras): Ho mia dio, ĉu vi ĉiam devas diri tiajn embarasaĵojn?

La kelnero revenas: Jen via vino. Por kiu estis tiu en la la pura glaso?

**Proverbo de la monato** (elektita de Georg)

Hodiaŭ mi prezentas proverbon kiu temas pri sencerteco aŭ en plia senco pri sentaŭgeco:


„Fluidaĵo sen difino, nek vinagro nek vino“

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme_0769.htm

**Enigmo**
De Felmano Ulriko

Antaŭnelonge, pola kaj hungara esperantoamikoj de mi metis en nian retan tujmesaĝilon la sekvajn du preskaŭ samajn bildojn:




Ĉu vi trovas la dek malsamecojn?

# Esperantaĵo

## ZEOj
de Fellmann, Ulriko

Eble ne ĉiu jam konas tiun mallongigon: ZEO, kio signifas "Zamenhof/Esperanto-objekto", tio estas objekto omaĝe al Ludwik Zamenhof aŭ al Esperanto.
Ekz-e, en Frankfurto, la stratoj Zamenhofweg kaj Esperantostraße en la urbero Sachsenhausen estas ZEOj. En Bad Nauheim troviĝas en parko memorŝtono pri la du vizitoj en sanigejo (Kurhaus), kiu per inskribo memorigas pri la du ĉeestoj de Zamenhof tie. En Karlsruhe troviĝas eta "Esperantobrücke". Kaj en Varsovio troviĝas eble la plej grava ZEO, la tombo de Zamenhof.

Pri la ZEOj de la mondo aperis antaŭ 33 jaroj kataloga libro de Hugo Rolinger: "Monumente pri Esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto Objektoj en 54 landoj". Universala Esperanto Asocio, Rotterdam 1997, ISBN 92 9017 051 4.
Intertempe, kompreneble, multaj novaj ZEOj aperis, kaj troviĝas listo en interreto.

Antaŭnelonge, mi tute hazarde en la interreto trovis tre belan ZEOn, kiun mi antaŭe ne konis, temas pri Esperanto-bistroo en Tokio, oficiale nomita "Esperanto-Vegana Kafejo". Sur la interreta paĝo de ĝi troviĝas pkuraj belaj fotoj, el kiuj mi kelkajn ĉi tie volas prezenti al vi:















Se vi do iam vizitos Tokion, ne maltrafu tiun ZEOn, eniru, kafumu aŭ manĝu, parolu Esperanton, faru foton, kaj publikigu tiun ĉi tie aŭ en nia kluba Telegrama kanalo Esperanto Frankfurt!

Mi deziras al vi bonan viziton, apetiton, kaj babiladon!
Via Felmano Ulriko

# Lasta Paĝo – Invito al membrokunveno

## Einladung zur Mitgliederversammlung

Einladung zur Mitgliederversammlung der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt e.V. am Dienstag, 17.3.2026, 19 Uhr im Saalbau MÜZ, Friedrich-Rumpf Raum

Tagesordnung

Beginn: 19:00 Uhr
TOP 1: Begrüßung, Feststellung der Beschlussfähigkeit
TOP 2: Findung eines Protokollanten
TOP 3: Annahme der Tagesordnung
TOP 4: Genehmigung des Protokolls der letzten Mitgliederversammlung
TOP 5: Tätigkeitsbericht des Vorstandes
TOP 6: Finanzbericht des Rechnungsführers
TOP 7: Bericht der Kassenprüfer
TOP 8: Diskussion der Berichte
TOP 9: Entlastung des Vorstands
TOP 10: Wahl neuer Kassenprüfer
TOP 11: Programmplanung
TOP 12: Anträge
TOP 13: Sonstiges

Anträge des ESF-Vorstandes

Die MV am 17.3.26 möge beschließen: Anlässlich des 125 jährigen Bestehens der Esperanto- Gesellschaft Frankfurt, Gründungsdatum am 30.09.1904, bemüht sich der Vorstand den Esperanto-Weltkongress im Jahr 2029 nach Frankfurt am Main zu holen.

Wir bitten um ein zahlreiches und pünktliches Erscheinen.
Anträge bitte bis 3.3.26 schriftlich oder per Email an den Vorstand, Email: esf-estraro@listeo.eu